

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

januaro - februaro 2006 • numero 79 | volumo 14 - numero 1



**ROKARTO ĈE LASCAUX EN
FRANCIO KAJ KAKADU EN
AŬSTRALIO**

← Ĉe Kakadu

El Lascaux



Nia plej maljuna loĝanto

Harriet

175-jaraĝa



ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIO

Numero 79 • Vol 14.1 • Jan–Feb 2006

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas “Mellel”, kaj la tiparoj estas “Futura”, “Onyx” kaj “Minion Pro”.

ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Libroservo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas \$A3.00 + poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

Esperanto sub la Suda Kruco estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur la lasta paĝo de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

esk@esperanto.org.au

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2006, AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* preparis Igor de Oliveira Couto.


En Ĉi Tiu Numero

Nia plej aĝa loĝanto	3
(de Donald Broadribb)	
Nova DVD-filmo en Esperanto	4
La nova televido-stacio esperanta per Interreto (de Donald Broadribb)	5
Raportas Franciska Toubale:	
Instrui en Hanojo	6
Renkonto en Pluezec.....	8
La 78a SAT-kongreso	9
Ordinara ĝenerala jarkunveno 2006 ..	10
Why China Respects Esperanto (by Paul Dessailly)	11
Mortis Rolf Ahrens	13
Korektoj	14
Radikala Melbourne	15
De Kakadu al Lascaux (de Helen Palmer)	16
La Kvara Azia Kongreso de Espe- ranto (de Paul Desailly)	19
La Sesa Ĉina Kongreso de Espe- ranto (de Paul Desailly)	20
Interrete	21
La Nova Forno de Onklino Matilda (de Tony Peterson)	22
Aunt Matilda’s New Stove.....	23
Libroj ricevitaj.....	24
Parolado de D-ro Peter Ellyard	25
Odlo Bokserp — Konkurso!	30

Esperanto sub la Suda Kruco
estas legebla per Interreto ĉe:
<http://esperanto.org.au>

Nia Plej Aĝa Loĝanto

de Donald Broadribb



Harriet, 175-jaraĝa
Naskiĝtago: ĉ. 15a de novembro 1830

lom pri ŝi

Parolas Terry Irwin:

Ŝi estas la plej afabla el ĉiuj bestoj en nia zoo. Ŝi estas la plej amata. Efektive, Harriet venas al vi por karesiĝi. Ŝi estas parto de nia blindula programo: kiam homoj kun nebona vidkapablo vizitas nian zoon, ŝi estas inter la bestoj kiujn oni rajtas tuŝi kaj senti kaj sperti. Mi ne scias kion necesus fari por instigi Harrieton mordi. Ŝi plene amas homojn. Ŝi stariĝas tre alta, tiel ke oni povas grateti sub ŝia karapaco kaj senti ŝian molan kolon, kaj ŝi elmetas sian kapon por manĝi ion:



...kaj ŝi havas belegajn okulojn kaj ŝi havas malgrandajn diskojn kie troviĝas ŝiaj oreloj, kaj plej molan haŭton sur sia kapo. Kaj necesas purigi ŝian grandan karapacon per malvarma akvo ĉiumatene, ĉar ĉiuj uzas ŝin kiel moviĝantan rokon. Lacertoj kuŝas en la sunlumo sur ŝi, birdoj staras sur ŝi, kaj ni plene purigas ĉion de sur ŝi ĉiumatene tiel ke ŝi estas bela kaj preta por la eventoj de la tago.

[El *The World Today* de
Aŭstria Brodkasta Korporacio,
10an de decembro 1999]

La historio de la tertestudo (Geoche-lone nigra darwin) Harriet estas inter-esa. Ŝi eloviĝis sur insulo en la grupo Galapagoj, en novembro 1830. Nov-embro estas la normala tempo de la “naskiĝo” (eloviĝo) de testudoj sur tiuj insuloj. Ŝia subspecio estas nuntempe tre rara, kaj kvankam oni deziris trovi virtestudon el ŝia specio por esti ŝia edzo, la zoo ne sukcesis trovi specime-non virseksan.

Oni ne konas vivantan beston pli aĝan ol Harriet.

Laŭ multaj historiistoj, Harriet estis unu el tri testudoj kiujn Charles Darwin kolektis. Denove laŭ Terry Irwin:

Charles Darwin kolektis tri testudojn en 1835 kiam li vizitis Insulojn Galapagoj... [N]i scias ke li kunprenis tiujn tri testudojn al Anglio; tamen en 1841 ili revenis al Brisbane, sur la ŝipo Beagle, estrata de kapitano [John] Wickham. Ili ekloĝis en la Botanikaj Ĝardenoj kaj restis tie dum multaj jaroj.

Per studo de la DNA de Harriet, ni certigis, laŭ Universitato Texas ANM ke ŝi estas unu el la trio kunprenita [de Darwin].

Darwin en siaj dokumentoj skribis ke li kolektis la tri testudojn en 1835, kaj li priskribis ilin kiel “grandaj kiel manĝotelero”, do proksimume kvinjaraĝaj.

Necesas tamen aldoni ke ne ĉiuj historiistoj akceptas ke Harriet estis inter la

testudoj de Darwin. Ŝia specio estas specife insulgalapaga, kaj ŝia aĝo estas pli-malpli certa. Sed iom post la jaro 1900 la specifaj zoologiaj dokumentoj pri Harriet pereis dum inundo, do ŝia rilato kun Darwin estas laŭ legendo.



Harriet tre amikemas al homoj

Harriet unue estis nomata Harry, laŭ la nomo de la kuratoro de Brisbanej Botanikaj Ĝardenoj Harry Oakman, sed en 1960 oni trovis ke temas pri testudino, kaj oni renomis ŝin Harriet.

Harriet nun loĝas en Aŭstralia Zoo, norde de Brisbane. □

Nova DVD-Filmo en Esperanto

En decembro 2005 aperis nova DVD kun Esperantaj voĉoj, de konata sovetia scienc-fikcia filmo “Kin-Dza-Dza!”

La 128-minuta, humuroplena, profunde filozofia filmo estis farita en 1986, kaj nun enhavas elekteblajn sontrakojn kun Esperanta sinkrona traduko kaj la origina rusa. Oni povas elekti rigardi la filmon kun opcie elekteblaj Esperantaj aŭ rusaj ekrantekstoj, aŭ entute sen ajna el ili.

Tio permesas uzi la filmon por plej diversaj celoj, kvankam la ĉefa estas lingvopraktikado. La filmon jam prove vidis kelkaj personoj, kaj ili konfirmis, ke por tiu celo la Esperanta sonigo plene taŭgas.

La kosto de unu DVD estas 12 eŭroj, kaj estas mendebla ĉe la libroservo de UEA. La traduko, voĉigo kaj prizorgado estas dank’ al Andrej Grigorjevskij.

[laŭ *ret-info*]

La Nova Televido-Stacio Esperanta per Interreto

raportas Donald Broadribb

Jam de multaj jaroj disflugas ideoj pri establo de Esperantolingva televido-brodkastado. Antaŭ la alveno de Interreto kaj de “broadband”, tio ŝajnis kondamnita esti nur revo. La tekniko, la kosto, la akiro de sufiĉa materialo por plenigi programojn...

Sed nun la revo fariĝis realaĵo. La nombro da filmoj en Esperanto, da vidbendoj, kaj alia materialo haveblas por funkciigi ĉiutagajn elsendojn.

La retadreso estas:

<http://internacia.tv/>

Internacia televido nuntempe rigardeblas kaj aŭskulteblas kaj per Windows- kaj per Macintosh-komputiloj — per uzo de la senpaga programo Windows Player. Necesas “broadband”, ĉar la elsendo estas je 131 Kbps. La bildoj estas sufiĉe klaraj, kaj la voĉoj sufiĉe kompreneblaj por ebligi ĝueblan rigardadon.

Tamen necesas emfazi ke por spekti la programojn vi bezonas relative novan komputilon tre kapablan (ekz. Mac G4 aŭ G5, minimume 1-gigaherza; aŭ ekvivalenta Windows-komputilo).

Ankaŭ du DVD-oj estos eldonitaj de Internacia Televido. Pri ili estas anoncite:

La administracio de la esperantista televidkanalo antaŭvendas la unuajn

du DVD-ojn kun programoj originale faritaj de Internacia Televido. Unu el tiuj DVD-oj estas speciala programo *Televida Epopo*, kiu priskribas la trijaran kampanjon por la establo de esperantista televidkanalo. En *Televida Epopo*, oni vidos la planon krei televidkanalon en Esperanto, same kiel la problemojn, kiujn alfrontis nia teamo laŭlonge de la kampanjo. Temas pri historia dokumento, kaj ankaŭ memoraĵo pri la plej grava atingo de la esperantistoj ĉe la komenco de ĉi tiu jarcento.

La alia DVD estas *Infanurbo* — Videoedisko 1, de la baldaŭ lanĉota porinfana programo de Internacia Televido. Estos la unua DVD por infanoj en la lingvo Esperanto, kun muziko, pupoj, kartunoj kaj multe pli.

La prezo de ĉiu DVD originale farita de Internacia Televido normale kostos 20 eŭrojn, sed al tiuj, kiuj antaŭmendos ilin, la kosto falos al 15 eŭroj — 25%-a rabato! La sendo-kosto estas 5 eŭroj ene de Brazilo, kaj 10 eŭroj por aliaj landoj. Por pliaj informoj pri la antaŭvendo de unu aŭ de ambaŭ DVD-oj, bv. kontakti la administracion de Internacia Televido:

vendo@internacia.tv.



👁️ por ridigi vin 👁️

Eltiraĵo el lernolibro pri aritmetiko: “Se unu virino povas naski unu infanon post naŭ monatoj, kiom da infanoj povas 27 virinoj naski post tri monatoj?”

[El *Telopeo*]

Raportas Franciska Toubale

spertojn en Vjetnamujo, Francujo, Kroatio

1. Instrui en Hanojo

La unua etapo de mia ĉi-jara vojaĝo eksterlanden estis Hanojo, kie mi restadis dum du semajnoj por instrui Esperanton.

Mi instruis al tri grupoj. Por la komencantoj kaj progresantoj mi devis iri al lernejo en la koro de la malnova urbo, kies enirmuron ornamas memortabulo pri la enkonduko de Esperanto en Hanojo. Fakte la franco, Lucien Peraire, kiu bicikle atingis la Orienton, konatigis tie Esperanton en la tridekaj jaroj.

La progresintoj venis al mi, tio estas, al la domo de sinjoro Xuan Thu, kiu gastigis min. Mi povas diri ke lia domo estas kvazaŭ la Esperanto-domo de Hanojo, ne nur pro tio ke unu salono fariĝis klasĉambro kun tabulo sur muro, sed ankaŭ pro tio ke la membroj de la asocio, ĉu junaj, ĉu ne tiom junaj, ŝatas lin viziti kaj paroli kun li. Xuan Thu diris al mi ke Esperanto permesas eviti la hierarkian rilaton, kiun la vjetnama lingvo trudas. Tiel la esperantistoj povas senti sin pli proksimaj unu de la alia, aparte kiam ili ne samaĝas.

Kvankam plejparto de la esperantistoj en Hanojo estas junaj — eĉ fondiĝis VEJO pasintan majon, tio estas Vjetnama Esperanto-Junulara Organizo — ne tiom multe da gejunuloj kiom atendite ĉeestis mian kurson pro la jaraj ekzamenoj. Pro sama kialo mia prelego en la angla en la universitato pri fremdaj lingvoj al la studentoj kiuj fariĝos instruistoj de la angla ne estis

fruktodona. Aliflanke plejparto de la maljunuloj sekvis ĉiujn miajn kursojn je ĉiuj niveloj. La celo estis observi mian instrumentodon. Ili konkludis ke tiuj esperantistoj, kiuj scipovas bone legi kaj skribi, sed ne kapablas kompreni kaj diri la plej simplan parolatan frazon, ne tute kulpas. Ili estas pretaj anstataŭigi metodon bazitan sur tradukado kaj gramatiko per paroliga metodo.



Lernantinoj apud la memortabulo

Pro tio ke mi ne scipovas la vjetnaman, la kunsidoj pri la organizo kaj la fina taksado de miaj kursoj okazis tute en Esperanto. Tiel la ĉeestantoj konsciis ke ili kapablas tion fari. Mi kompreneble kuraĝigis ilin interparoli esperante inter si por altigi la nivelon de la tuta asocio. Se mia ĉeesto povos instigi nur tiujn ŝanĝojn, mi konsideros ĝin pozitiva.

Alia projekto de la Vjetnama Esperanto-Asocio estas krei vjetnaman ekzamenkomisionon. Kiam Marcel Leereveld vizitis la landon, li konsentis agi kiel ĉefekzamenanto ankaŭ por

Vjetnamujo. Ĝis nun unu esperantisto, sinjorino Lan, sukcese trapasis la superan ekzamenon. Kiam pluraj el ili akiros rekonon de alta nivelo en Esperanto, ili povos adapti la ekzamenojn al Vjetnamujo tiel ke la kandidatoj ne plu bezonos ankaŭ scipovi la anglan aŭ la francan.



La adiaŭa kuko de sinjoro Ha

Mi tre ŝatis la manieron per kiu mia restado estis organizita. Ĉiu membro havis sian apartan taskon: ĉu provizi al mi manĝon, veturigi min al la klasĉambro, provizi aparatojn, kretan por la kurso, organizi vizitojn al muzeoj, cirko, vidindaĵoj. Tiel mi povis pli profunde konatiĝi kun multaj el ili kaj mi rimarkis ke eble dividi taskon aŭ amuzon estas la plej bona maniero praktiki Esperanton kaj spertiĝi je la lingvo.

La “Vilaĝo de Paco” kaj la Nacia Centro por blinduloj estas la du plej emociaj vizitoj, kiujn mi faris en Hanojo. Al ambaŭ gvidis min sinjorino Lan.

En la “Vilaĝo de Paco” estas flegataj la infanoj, kiuj suferas de la sekvoj de la

ĥemiaĵoj verŝitaj de la usona armeo dum la milito. Tiuj infanoj apartenas al la tria generacio post la milito. Iliaj muskoloj ne funkcias, ili ne kapablas stari aŭ moviĝi. Ĉiujn tagojn masaĝistoj masaĝas ilin por alporti al ili iom da komforto. Kelkaj el ili sukcesas fari ekzercojn por fortigi la muskolojn. En kelkaj kazoj ili lernas produkti artaĵojn, kiuj vendeblas en la vilaĝo. La proceso kontraŭ Usono cele ricevi kompencon malsukcesis. Nun la prizorgantoj de la centro provas informi la mondon kaj trovi monrimedojn por funkciigi la centron.

Sinjorino Lan instruis Esperanton al grupo de blinduloj kaj tiel kreis rilaton kun la Nacia Centro por Blinduloj, instituto en kiu la blinduloj de la tuta lando venas por lerni sendependiĝi kaj masaĝi laŭ la Terapio Yumeiho por perlabori sian vivon. Estas facile studi tie nun dank’ al la moderna biblioteko, kie komputiloj povas ŝanĝi iun ajn tekston al brajla skribado. Japanaj esperantistoj kaj sinjorino Lan ludis gravan rolon en la akiro de tiuj gravaj aparatoj, sed provizi la centron per taŭga papero ankoraŭ problemas. La nombro de blinduloj en Vjetnamujo estas pli granda ol en aliaj landoj. Unu el la kaŭzoj estas malriĉeco, kiu ne donas aliron al sufiĉe bona nutrado.

Ekde la 2a Azia Kongreso en Hanojo en 1999, Esperanto daŭre disvolviĝas, ni esperu ke dank’ al tio ankaŭ solidareco pligrandiĝos. □

🦋 por ridigi vin 🦋

Fin(n)sume kaj resume

... konatiĝi kun finnaj traadiciaj loĝejoj en muzeovilaĝo ...

(Anonco en *Esperanto* 1996:3 [Laŭ L.O.d.E.])

2. Renkonto en Pluezec

Jam de naŭ jaroj esperantistoj renkontiĝas dum sep tagoj, la trian semajnon de aŭgusto, en la urbo, Pluezec, sur la norda marbordo de Bretonujo, en Francujo inter Saint Briec kaj Paimpol. Tiam Roger Eon invitis Katalin Kovacson instrui malgrandan grupon, kiu nun kreskis ĝis cent kvindek homoj, sed tiun nombron la organizantoj ne deziras superi. Ĉiam venas eksterlandanoj, kio devigas uzi Esperanton. Ĉi-jare ĉeestis delegacio de kvin ĉinoj kaj tri aŭstralianoj: Sandor Horvath, Helen Palmer kaj mi.

La programo ne multe diferencas de tiu de la somerkursaro en Aŭstralio. Matene okazas lingvokursoj je diversaj niveloj, inkluzive de kurso por infanoj aŭ kursoj en kiuj oni uzas la lingvon alicele laŭ la proponoj de la kontribuantoj. Ĉi-jare, ekzemple, Roland Cuenot cerbumis kun sia grupo pri tradukarto.

Je la komenco de la posttagmezo la ĉeestantoj ekskursas en la regiono, kie troviĝas krom la maro multe da vidindaĵoj, kaj poste eblas praktiki jogon, kanti, teatrumi, komputi aŭ lerni la bretonan lingvon pere de Esperanto.

En la vespero oni distras sin aŭ aŭskultas prelegojn, kia tiu de Helen pri la nacia parko Kakadu.

Roger rimarkis ke la esperantistoj ŝatas resti inter si. Laŭ li, tio estas eraro. La renkonto estas organizita tiel ke kelkaj aktivecoj estas komunaj kun la loĝantaro aŭ eĉ la feriantoj. En la komunuma halo, kiu estas la renkontejo de la kursanoj, same kiel ĉiujn semajnojn en la jaro la pluezecanoj kantas maristajn kantojn kaj dancas bretonajn dancojn

kaj invitas la novalvenintojn malkovri iom de la bretona kulturo.

Mi ŝatas ĉeesti tiun renkonton ĉar mi povas revidi multe da konatoj aŭ konatiĝi kun la korespondantoj el Quimper de la “Melbourne Esperanto learners”-grupo. Sed allogis min ĉi-jare la kurso de Katalin Kovacs “Arto-Ŝoko”. Ĉiuj ekzercoj estis bazitaj sur la vivo kaj la verkado de la pentristo Van Gogh, kaj celis krom praktiki Esperanton pli profundigi la scion pri tiu kortuŝa artisto. Se vi vidas reklamon pri tiu kurso, ne hezitu, aliĝu, vi ne bedaŭros tiun sperton. □



Katalin kaj la kursanoj de Arto Ŝoko

Restoracio en la Mallumo

Mi ne povis restadi en Parizo sen renkonti mian malnovan amikon Fabrice. Li invitis min al tute nekutima restoracio, kies nomo estas “Dans le noir” kiu signifas “En la mallumo”.

La enirĉambro de tiu restoracio aspektas kiel drinkejo, sed sen tabloj kaj seĝoj. Laŭlonge de unu muro viciĝas ŝrankoj en kiujn oni metas siajn sakon, mantelon, ktp; tiel ke oni povu havi la manojn tute liberaj. Oni elektas

sian menuon, aŭ eĉ surprizan menuon, kaj nomon por la grupo. Tiam venas kelner(in)o, kiu kondukas nin al la manĝoĉambro en absoluta mallumo. Kompreneble ĉiuj kelneroj tie estas blindaj kaj tute lerte povas moviĝi, do ili estas niaj gvidantoj.

Oni staras unu post la alia, metinte manon sur la ŝultron de la antaŭa persono. Oni ne rajtas ekstari sola, necesas voki la kelneron, kiu respondecas pri la grupo.

Tie la manoj estas tre utilaj: fingro en la glaso indikas kiam ĝi estas plena,

balaado de la telero per mano sciigas ke ĝi estas malplena.

Ofte la homoj iom timas kaj parolas pli laŭte ol necesas, sed pli volonte oni interparolas kun nekonatoj.

Kvankam oni scias ke neniu katastrofo trafos nin — ne tiel estas por blindulo surstrate — dum la daŭro de manĝo eblas sperti kia estas la vivo de nevidanto. La plej interesa afero estas laŭ mi ke la roloj estas inversaj: en la restoracio “Dans le noir” la vidantoj bezonas helpojn kaj lernas kompreni la diferencon inter helpi kaj degnadi. □

3. La 78a SAT-kongreso



Senminigado en Sisako

Ĝi okazis de la 2a ĝis la 9a de julio 2005 en la kroata ĉefurbo, aŭ pli ĝuste en vilaĝo sur la rando de Zagrebo: Grad Mladih. Ni loĝis en dometoj disaj en granda parko, do en trankvila loko. Ne estis problemoj por renkonti unu la alian. Plie, per tramoj aŭ aŭtobusoj estis facile atingi la centron de la urbo.

Pro neklaraj kialoj, nur okdek personoj, el tri kontinentoj — Eŭropo, Azio, Aŭstralio — ĉeestis tiun kongreson, kio ebligis trakti la diversajn raportojn kaj solvi la problemojn pri la funkciado de la asocio en familiareca etoso.

La sekretario de la Plenum-Komitato, Krešimir Barkoviĉ, kiu scipovas la kroatan lingvon, kaj la gekamaradoj Weiss, kiuj estas iniciatantoj de la projekto finance subtenata de la franca registaro, vizitis Sisakon, sude de Zagrebo, kie teamo forigas la kontraŭpersonajn minojn enmetitajn en la teron dum la milito de la naŭdekaj jaroj.

Dum tiu kongreso la kontaktoj kun lokaj homoj ne mankis. En la nacia parlamento, ni familiariĝis kun la kroata politika reĝimo. En urbeto survoje al Krapina, la urbestro kaj kelkaj konsilantoj klarigis kiel ili vigligas sian urbeton por allogi kaj reteni la loĝantojn. Ni estis akceptitaj ankaŭ de la urb-

estro de Velika Gorica.

Por kontentigi la SAT-membrojn, kiuj aparte interesiĝas pri sociaj problemoj, venis reprezentantoj de “Komunuma Ekonomio”, fondita de la katolika eklezio en Sao Paulo, por prezenti sian komunumon, kaj reprezentantoj de sendependa sindikato de Kroatio, kun kiuj eblis interŝanĝi ideojn pri dungado, senlaboreco, emeritiĝa asekuro kaj nigra laboro.

Folklora ensemblo distris nin dum unu vespero. Barbara Othman kaj Tat-

jana Vukelich, artistoj de la Kroata Popola Teatro en Zagrebo, regalis nin per klasikaj kantoj kaj melodioj.

La ekskursoj kondukis nin al etna vilaĝo Kumrovec, en kiu troviĝas ankaŭ domo dediĉita al Tito; Krapina, kie ni renkontis la “Homo Sapiens” malkovritan en 1899; la kastelo Trakoŝćan kaj la restaĵoj de la romania epoko en Velika Gorica.

Ni esperu ke la venonta kongreso en la urbo Beograd allogos pli da ĉeestantoj. □

OSIEK-PREMIO 2005

En 2005 la Osiek-anoj proponis 26 verkojn premiindajn; ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 15an de julio 2005, dum la IEK en Rafina, Grekio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Christian DECLERCK



pro

“Tarokoj kaj epokoj”

Gratulon!

La premio, 600 €, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro

informoj: *La Gazeto* 55210 Creuê Francio <http://osiek.org>

Ordinara Ĝenerala Jarkunveno de AEA 2006

Okazos je la 19:30-a horo inter la 23-a, 24-a kaj la 25-a de Januaro 2005

Ĉe: Kianinny Cabins Resort, Tathra Rd, Tathra, NSW 2550

La tagordo enhavos:

Raportoj de estraranoj

Raportoj de membroj

Elektoj

Aliaj aferoj

Ĉuj estas bonvenaj kontakti min ĉe sekretario@esperanto.org.au por enmeti siajn ideojn en la tagordo.

Miranda Lutz

←p.30 (ĉ) Kolorigo de la bildo povos esti farita per kolorigilo ia ajn.

2. Juĝos Odlo Bokserp. Lia(Ŝia?) decido estos definitiva sed ĉia subaĉeto estos akceptita.

Sendu al Esperanto sub la Suda Kruco, PO Box 643. York WA 6302, Aŭstralio. Sendajoj per Interreto estas ankaŭ akceptotaj.

Dungitoj de Odlo Bokserp, kaj membroj de la Antarktika Esperanto-Asocio ne rajtas partopreni. □

Why China Respects Esperanto

by Paul Dessailly

Outline of a speech to students in China

Topic: A Universal Auxiliary Language

Paul Dessailly is currently employed as an English teacher at a university in China. On the side, he also teaches Esperanto courses.

Preparatory note: Love your subject and prepare well. Use maps, photos and flags to add interest. Ask people to join in with questions and comments. If you read a speech keep eye contact.

Main Points

1. Disagree with me during my speech. From the clash of differing opinions the shining spark of truth comes forth. What does the word Esperanto bring to your mind?
2. Continue your English studies for now and pass your exams because English is the language of business and science today. Which countries officially use English today? When the winds of change blow again think of Esperanto for world peace!
3. What is the difference between (a) one world language (b) international languages — how many are there and how widespread are they? (c) a universal auxiliary language? The Esperantists want to have all children learn the mother language and secondly an easy, neutral, second language which will be the same in every school in the world.
4. Of course Esperanto is easily learnt with a teacher but you don't need one because it is simple and regular in spelling, grammar and pronunciation. It also has flexible word order and an easy vocabulary. Why is flexible word order important?
5. Brazil and Japan are two strong countries for Esperanto. The first is a country with many artistic people and the Japanese love science; neither people would accept Esperanto if it were faulty. Which countries use two or more languages officially?
6. Esperanto looks at first to be a little difficult because it has a few unusual letters. However, because it is simple and has logic it is in fact many times easier than English. Never giving up and studying in the early morning and before you go to bed are the keys to success in language learning.
7. The past shows us how quickly the international language situation can change.
8. If I had been teaching English in Beijing forty years ago I might have been put in a prison for spies because Russian was official here at that time. However, Russian was suddenly thrown out. What hap-

- pened? Only a few Chinese study Russian now.
9. The popularity that the English language now enjoys in China nearly ended in 1999 when NATO's bombs destroyed the Embassy of China in Yugoslavia. An error?
 10. Which countries use French today? As an international language the beautiful but difficult French language has become much less popular since the end of World War II when English suddenly became the number one language. However, French was thought of as the only choice as an international language until 1945. World history has many similar stories; Latin and Ch'ing dynasty Manchu are interesting examples.
 11. Signs of the power of the French language remain even today in many ways:
 - a. Diplomats: French is sometimes called the language of diplomats, Chou En Lai
 - b. Aristocrats: kings, queens, princes, princesses, dukes etc.
 - c. Olympics: international athletics competition started in 1896 by the French.
 - d. Post Office: every post office in the world accepts written French for parcels.
 12. Esperanto's pronunciation: a e i o u. Each letter makes only one sound.
 13. Switzerland is a neutral country. Esperanto is neutral too in politics, religion, nationality, class, wealth, and gender. This is why the central government of China has two large teams of talented Esperantists in Beijing producing:
 - a. some of the best Esperanto magazines in the world.
 - b. programs in Esperanto which are broadcast four times every day from China Radio International.
 14. Accent or stress in Esperanto is always on the second last syllable. Do you know some English words like "record" and "rebel" which change their stress?
 15. In a time of danger we discover who our true friends are. By 9-XII-1939 the Guo Min Dang, with U.S. financial assistance, and the armies of Japan had nearly destroyed Chairman Mao Zedong. On that day he said in Yan An: "It is my belief that if Esperanto is adopted as a means to promote the idea of true internationalism and a true revolution, then Esperanto can be learnt and, in fact, should be learnt."
 16. Uninformed people often say that Esperanto has no culture. A very large amount of original and translated Esperanto literature has been growing since the Polish eye doctor, Ludovik Zamenhof, invented the language in 1887. Many of China's best writers and

thinkers would not have supported Esperanto if it had no culture.

17. Bakin Lu Xun Chen Yi Zhang Tai Yan etc.
18. The talented persons named above along with many famous people from abroad would never have praised Esperanto if it were a bad idea. Esperantism is an idea and a movement which has in it some of the beauty and hopes of early Communism.
19. Gandhi, Tolstoy, Sun Yat Sen, Diesel, Castro, Tito, Einstein, Helen Keller etc.
20. Some other benefits existing already in the Esperanto world are:
 - a. an informed, independent and international press, radio and television.
 - b. Esperanto's grammar and vocabulary help you to learn other languages. How?
 - c. Free homestay: Free accommodation in the homes of Esperantists.

This service is available in hundreds of cities throughout the world; major cities have a dozen or more homes from which you can choose; real help for young world travellers

- d. If you want only to make money today learn English, the language of business. If you want to save money and make friends too – learn Esperanto.
21. Few of you will ever speak my language as well as I do. Nor will I speak your language as well as you. Confucius said: "To teach is to learn." To do either well, one must love the task. We learn our first language easily from our mothers, with her endless love. Thinking of the past and how Europeans attacked China (Yuan Ming Yuan and Guangdong) and how the world economy is mainly in the hands of English speaking nations, why do we expect Asians to love English and its 500,000 words? □

MORTIS ROLF AHRENS

1939-2005

Ni informiĝis ke nia membro Rolf Ahrens mortis dum la vespero de lundo, la 14an de novembro.

Li naskiĝis en Herne, Germanio, unuaskito de Elfriede kaj Otto Ahrens. Kiel junulo li lernis Esperanton. Lia familio migris al Aŭstralio en 1956, kie ili laboris ĉe bieno dum iom da

tempo. Poste ili transiris al Ballarat.

Li interesiĝis pri multaj temoj: li studis sep lingvojn, multe entuziasmis pri elektroniko, kaj okupis sin pri fotografado, filmado, aŭtoj, kaj precipe komputilado.

Rolf postlasis edzinon, Helen, kaj filon, Gerard. □

KOREKTO kaj pardonpetoj de via redaktoro

En nia lasta numero (#78, novembro-decembro 2005) svarmis tiom da eraroj ke eble estus pli facile indiki tiujn erojn kiuj ne estis eraraj!¹

Unue, la persono kiu aperas kun Svetislav Kanački en la fotoj sur paĝoj 1 kaj 16 estas ne James Dwyer sed László Farkaš, produktisto kaj panelisto.

Due, pro misaĉo de via kompostanta redaktoro, la literoj D, L, f, kaj sur paĝoj 2, 3 kaj 4 eĉ ankaŭ aliaj literoj, aperis nur kursive anstataŭ normale. (Kompense, kiam kursivaj literoj ja estis celitaj, ekzemple en titoloj de libroj, nur normalaj nekursivaj literoj aperis...)

Trie, sur p. 2 estis skribite ke temas pri numero 77 de la gazeto anstataŭ 78.

Kvare, sur paĝoj 17 kaj 18 (kaj aliloke) la majuskletoj ege fuŝiĝis.²

Via kulpoplana redaktoro pardonpetas al la legantoj.³

¹ Kaj vi kredis ke mi ferias en Antarktiko! Kiom facile vi trompiĝas, stulta Reaktoro.— Odlo Bokserp. (Vidu paĝon 18 de tiu numero.)

² Se vi ne scias kio estas majuskletoj, vi fartos plibone sen tiu scio.—Odlo Bokserp.

³ Alian mison vi nepardoneble malrimarkis: sur paĝo 18, sur mia granda bildo la dato estas misskribita 1936 anstataŭ -2936. —Odlo Bokserp.

Kelkaj aliaj korektoj

En la artikolo “Mallonga klarigeto” de Marcel Leereveld, en *ESK* 77 (septembro-oktobro 2005), enŝteliĝis kelkaj gravaj komposteraroj. Ĉefe atentindaj estas:

La titolo: “Malonga klarigeto” estu: “Mallonga klarigeto”

Sur paĝo 17, dua kolumno, dua alineo, linio 22: “transitivaj, dum...” estu: “netransitivaj, dum...”



Streĉita kordo?

Unu el la plej bone venditaj liroj estas la “Postdomo” de la eksĉefredaktoro de la revuo “Esperanto”, István Ertl.

(Ĉina Radio Internacia, “Furorlibro ĉe kongresa libroservo“, 08/03 07:11 GMT; <http://esperanto.cri.com.cn/esperanto/2003/Aug/148289.htm>) [el *La Ondo de Esperanto*]

Nur por espertuloj

“La muziko kaj la arto en la Espertanta kulturo” estis la temo de la seminario...
[el *La Ondo de Esperanto*]









Radikala Melburno¹

(Sabaton, la 24an de septembro 2005, renkontiĝis 19 esperantistoj kaj iliaj amikoj ĉe la enirejo de la trajnostacio Flinders Street en Melburno, je la 10a matene, por esplori kelkajn lokojn kie okazis radikalaj aktivadoj post Mondmilito II.)

☺ Dek naŭ disĉiploj de Zamenhof elverŝiĝis ĉe la buŝo de la stacidomo² je la malfrua juneco de la tago. Ili amasiĝis ĉe la buŝo de la Internacia Librovendejo³ kiel buteoj, tiam ili snufis la fumon de eksplodinta pulvo⁴ ĉe la eniro de monabelujo⁵ ĉe 66 Elizabeth-strato.

La pordo de la tramo laŭ Collins-Strato hipopotame malfermiĝis por veturigi ilin al la katedralo, kie la dia vizaĝo⁶ de Jeff Kennet⁷ ensorĉis ilin. Poste ili vizitis la Metiistan Halon por elspezi pencon⁸ kaj aĉeti cerbomanĝon el la nuna Internacia Librovendejo. Tiam ili rajdis la ĉevaleton de tibio⁹ al la Viktoria bazono por pleniĝi la homan internon, escepte de Lez¹⁰, kiu akra kiel mustardo veturis hejmen per trajno kaj tramo por rigardi la aeran ping-pongon¹¹ per la idioto-skatolo.¹²

[Resumo farita de la grupo de Melbourne Esperanto Learners, laŭ Victorian Esperanto News decembro 2005]

-
1. Libro verkita de Jill and Jeff Sparrow pri la “kaŝita historio” de Melburno; la libro detalias turistan promenadon por vidi la lokon de diversaj misfamaj eventoj en Melburno. Ĉi tiu artikolo temas pri turisma promeno iom simila, de esperantista grupo.
 2. Flinders Street — 
 3. Librobutiko politike maldekstremaj, ne plu ekzistanta tieloke.
 4. Bombo, parto de interbatalado de jugoslavaj aktivistoj, en aprilo 1972 eksplodis ĉe la pordo de la banko ANZ en Melburno. Neniu vundis la eksplodo.
 5. La banko ANZ.
 6. Gargojlo sur la rekonstruita romkatolika katedralo en Melburno, fripone farita de la skulptisto de la nova fasado. — 
 7. Eksĉefministro de Viktorio. — 
 8. Arkaika eŭfemismo = urino. Antaŭ la transiro al decimala monsystemo en la 1960’oj, oni uzis la “brit-imperian sistemon” de pencoj, ŝilingoj, kaj pundoj. Oni devis pagi pencon (= iom malpli ol cendo) por rajti uzi la publikajn latrinojn, — 
 9. Aŭstraliangla stratjargono “shank’s pony” (tibia ĉevaleto) = oniaj kruroj. — 
 10. = László Farkaš. — 
 11. Ping-pongo = popola onomatopea nomo de tablo-teniso. “Aera ping-pongo” = insulta nomo por piedpilko-ludo. — 
 12. Popola serĉnomo por televidilo — 

Ekspresdantino serĉata

Pola esperantisto S-ro Stanislaw Smigielski volas rekontakti Wendy Symonds-on de St Clair, Dunedin, Nov-Zelando, kun kiu li korespondis en 1971 kiam ŝi estis mezlernejo, lernanto de F-ino Wildey. Bonvole respondu al: stansmi@neostrada.pl

De Kakadu al Lascaux de Helen Palmer

Mi decidis viziti la regionon Perigord, Francio, ĉefe por vidi la kavernojn de Lascaux. Kial?

En Aŭstralio mi laboras kiel medigardisto/gvidanto en Nacia Parko Kakadu. Tiu parko en la norda tropika parto de nia lando estas posedata de la indiĝenaj homoj (ne sen kondiĉoj!) kies prauloj tie pentris sur ŝtonojn. Mi havis la bonŝancon kunlabori kun ili.

Multe da turistoj venas al tiu parko, inkluzive de multe da eksterlandanoj. Tiuj kutime vere miras pri la ŝtonarto kaj ili ankaŭ tre ŝatas renkonti la indiĝenajn homojn sur ilia tero.

Ofte ili ankaŭ informas min pri aliaj lokoj kun ŝtonarto, ŝtonpenetraĵoj — la plej ofte menciita nomo estis la kavernoj de Lascaux.

Mi decidis malkovri la similecojn kaj diferencojn inter la du.

Multajn dankojn ankaŭ al Christian kaj Evelyne apud Perigueux por ilia malavara gastemeco.

Unue la similecoj inter la du lokoj: — La ŝtonartoj estas antaŭhistoriaj. Evidente, ambaŭ havas spiritajn signifojn. La arto plezurigas. Ekzistas diversaj problemoj konservi ĝin.

- Multe da turistoj vizitas ambaŭ lokojn.

- En ambaŭ lokoj la malfacileco kalkuli la aĝojn de la arto estas granda, ĉar kutime restis nur la koloroj kreitaj per mineraloj. Ofte la kalkuladoj de la aĝoj estas bazitaj sur la arkeologiaj trovoj apude.

Nun la diferencoj:

- Lascaux: La artaĵoj estas en ka-

vernoj. Nuntempe la turistoj ne rajtas vidi la verajn penetraĵojn. Ili nur vidas kopion.

- Kakadu: La arto estas kutime eks-tere, sur ŝtonmuro, ofte nur iomete sub natura ŝtontegmento.

- Lascaux: La aĝo de la penetraĵoj estas proksimume inter 25000 kaj 10000 jaroj. En Lascaux mem, verŝajne proksimume 17000 jaroj.

- Kakadu: La plej aĝa arto estas probable inter 20000 kaj 40000 jaroj, Sed la kreado de nova ŝtonarto daŭris en Kakadu ĝis 1980. La tradicio daŭras hodiaŭ, sed nun sur papero aŭ arbŝelo.

- Lascaux: La arto estas ĉefe bestoj.

- Kakadu: Pli vasta riĉeco de subjektoj: bestoj, homoj, simboloj, ĉaspenetraĵoj, bataloj, mitologiaj estaĵoj

- Lascaux: En la regiono ekzistas proksimume 30 kavernoj kun ŝtonarto. Ekzistas penetraĵoj kaj gravuraĵoj.

- Kakadu: Tra kompreneble pli vasta teritorio ekzistis proksimume 7000 lokoj kun ŝtonarto. Ĉefe estas nur penetraĵoj.

- Lascaux: Hodiaŭ ni ne scias la kialojn, la motivojn de la artistoj. Kial ili pentris tiujn bestojn, simbolojn?

- Kakadu: Ankaŭ hodiaŭ vivas indiĝenaj homoj kiuj multe scias pri la signifoj de la arto. Ne pri ĉiu loko, sed pri multaj.

- Lascaux: Oni ne rajtas foti. “Kopirajto” oni diris al mi. Mi ne tute komprenas. La pentristoj jam mortis antaŭ multe da jaroj. Eble le fotado ĝenus dum la gvido tra la kavernoj.

- Kakadu: La indiĝenaj posedantoj

ne ŝatas se komercistoj gajnas profiton per iliaj bildoj. Vere estas ilia posedaĵo. Ankaŭ kelkaj pentraĵoj estas sanktaj kaj ili estas faritaj ne por ĉiuj. Ekzemple kelkaj nur por viroj, kelkaj nur por virinoj.

- Lascaux: La francoj fieras pri la ŝtonarto. La registaro valorigas ĝin kaj elspezas monon por protekti ĝin

- Kakadu: En Aŭstralio la plimulto da homoj ne konscias pri tiu nacia trezoro kaj la plimulto da artaĵoj ne estas protektitaj. Vandaloj povas facile detrui ilin. Ofte turistoj el Eŭropo scias pli pri la ŝtonarto ol la lokaj aŭstralianoj.

Mi demandas al mi ĉu la fakto ke la

aŭstralianoj ne tiel valorigas la ŝtonarton de Kakadu baziĝas sur iomete da rasismo?

Por mi — parto de mia laboro estas valorigi kaj fierigi la aŭstralianojn pri la arto de Kakadu. Sed ne nur la arto sed ankaŭ la indiĝenaj homoj kiuj ankoraŭ vivas tie (kaj en aliaj partoj de la kontinento). Multe de la tradicia scio pri la arto restas kun ili hodiaŭ.

Post mia vizito al Lascaux, kie mi vidis kaj spertis tre interesan, tre historian kaj tre valoran ŝtonarton, mi nun eĉ pli valorigas la arton kaj la indiĝenajn homojn de Kakadu kaj mian bonŝancon koni kelkajn el tiuj homoj.

Komparaj fotoj

Lascaux



Kakadu



Lascaux



Kakadu



Lascaux



Kakadu



Lascaux



Kakadu



Rokartaĵoj ĉe Lascaux kaj Kakadu, flank-al-flanke.



👁️ por ridigi vin 👁️

Edzino: Donald, kiam ni lastafoje ricevis leteron de nia filo?

Edzo: Unu momenton, karulino; mi rigardos en mia ĉeklibro.

[El *Antaŭen* (Hispanio) jan. 2004]

RADIO 3ZZZ

nia aŭstralia Esperantolingva radio-programo

Kvankam la nombro da Esperantolingvaj radio-programoj aŭskulteblaj per Interreto ebligas informiĝi pri la vidpunktoj kaj opinioj de personoj en multaj landoj — kaj ankaŭ aŭskulti (vole/nevole) la politikajn asertojn de iuj landoj — ne scias ĉiuj esperantistoj ke nia propra aŭstralia Esperantolingva radioprogramo unuhora aŭskulteblas ĉiam ajn dum la semajno, ĉe www.3zzz.com.au. La vario de la enhavo — muziko, kurso, prelegoj, komentoj, intervjuoj, kulturaĵoj — faras ĝin interesa por ĉiuj aŭskultantoj. Ĉiu komputilo konektita al Interreto kapablas aŭskultigi la programon, kiu estas nova ĉiun lundan posttagmezon. Simpla modemo sufiĉas — ne necesas “broadband” — plus la senpaga programo RealPlayer (elŝutebla ĉe www.real.com).

Krozante la mondon, ne forgesu vian propran ĉehejman Esperantolandeton!

La Kvara Azia Kongreso de Esperanto

la 25an – 29an de Aŭgusto en Katmanduo

raportas Paul Desailly

Verdire la registaro de Nepalo, kies Ministro pri Turismo ĉeestis la solenan malfermon, kaj la amaskomunikiloj, kies ĉefa televid-kanalo pintatempe en la novaĵa horo prezentis tre favoran programeron, sincere aprezas nian Esperanto-agadon en Katmanduo ĉar preskaŭ ĉiuj aliaj “turistoj” forvaporigiĝis fronte al la politikaj perturboj de la dua plej malriĉa lando en la mondo. Multaj komercistoj lamentas la nunan magran rikolton pro la aktuala politika situacio; ankaŭ ili taksas esperantistojn valoraj, eĉ kuraĝaj.

Tiu nacia krizo je la rando de interna milito vekis jam kaj daŭre alvokas al la porpacaj idealoj de la Interna Ideo ne malmultajn gejunulojn. Male al la situacio en nia ankoraŭ relative paca regiono junuloj proporcie abundas en Nepala Esperanto-Asocio. Nacia orkes-

tro kiu konsistas ĉefe el latun-instrumentoj kaj urba ensemblo kies instrumentoj estas tradiciaj bonvenigis kaj distris nin dum horoj diversloke de kvinstela Kongresejo, Hotelo Radisson. Tian grandiozan bonvenigon mi ne spektis de post Qingdao en 1992 okaze de la 5a Pacifika Kongreso.

Hindio, sukcese kandidatiĝinte por starigi la 5an AK-on en Bangaloro en 2008, sendis al Katmanduo delegitaron da tre spertaj esperantistoj inkluzive de kuracistoj, lingvisto dungita de fame konata universitato, dancistino kaj advokato. Tiu lasta samideano (Venkatesh Reddy) kiu estas skoltestro loĝanta en Bangaloro kune kun niaj propraj Katja kaj Trevor Steele sindediĉe oferis multon monaton post monato por persone instrui la Internacian Lingvon en Hindio – ĉefe en Bangaloro. Pekino

sendis al Katmanduo du ĉarmajn kaj tre kompetentajn ĵurnalistinojn. Raportistino Ma de Ĉina Radio Internacia sonbendigis la penojn kaj aspirojn de Velanta kaj mi tra la jaroj antaŭenigi kaj instrui Esperanton en diversaj ĉinaj lernejoj, institutoj, universitatoj kaj privataj kaj ŝtataj. Elstaraj roluloj por sukcesigi la 4an AK-on kompreneble estas la LKKanoj tamen mi ne povas ne menciĝi kaj famigi laŭeble la persist-

emon de KAEM kaj la unuecon kaj malavarecon de la japana esperantistaro sen kies agado la evento verŝajne ne okazintus.

Postrikolto de la 4a AK kuŝas en tio ĉi ke la prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio, Mukunda Pathik kiu estas profesia instruisto de lingvoj, gvidas popularan kurson de Esperanto ĉe la Nacia Spirita Asembleo de Bahaanoj de Nepalo.



Mukund Pathik, prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio, apud la urbocentro de Katmanduo, kun nacia orkestro bonveniganta esperantistojn. Mukunda estas profesia instruisto, kiu nun gvidas Esperanto-kurson ĉe la Bahaa Centro de Nepalo, kun 20 lernantoj.

(La foton sendis Paul Desailly)

La 6a Ĉina Kongreso de Esperanto la 8an - 11an de Septembro en Quan Zhou de provinco Fujien, PRĈ. raportas Paul Desailly

Kiel kutime en Esperanto-kongresoj en Ĉinio ĉio glate iris kaj la etoso estis tre gaja kaj feliĉa se ne tre internacieca. Pli kaj pli evidentiĝas la sukceso de tiu ĉi — kontraŭ malalta kongres-kotizo oni ĝuis preskaŭ luksajn kondiĉojn kaj bunte abundan ekskursan kaj artan programojn por diri nenion pri kvar aŭ kvin grandiozaj manĝoj en la kon-

gresejo. Krom tio en kortuŝa solenaĵo pro la sincereco kaj servado dum longa tempo de la Prezidinto de Ĉina Esperanto-Ligo, sinjorino Tan, oni per interesa voĉdonado elektis novan estraron. Pli ol du cent esperantistoj ĉeestis la 4an AK-on inkluzive de aŭstraliano kaj niĝeriano.

Mi konsentas kun d-ro Corsetti ke

la estonteco de Esperanto apartenas fakte al Azio.

Aŭstralazianoj tiurilate havas tre bonan avantaĝon memvidantan. Domaĝe, el nia suda regiono mi sola hisis la standardon de la Suda Kruco kadre de ambaŭ belegaj Kongresoj. Por ni la Universala Kongreso de Esperanto en

Jokohamo, jardekon post nia propra en Adelajdo, promesas multon. Intertempe en nia mondoparto la 6an – 13an de Majo 2006 en tre internacia etoso en Ŝanhajo okazos la 58a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso. Ni esperas ke niaj vivovojoj ree kruciĝos tiam. □

• interrete

Biologia Libraro:

En la retejo <http://www.biolib.cz/en> troviĝas 10 mil sciencaj latinaj esprimoj pri fungoj, plantoj kaj animaloj, 4 mil el ili estas tradukitaj al Esperanto.

Temas pri unu el la plej ampleksaj biologiaj nomenklaturaj esperantolingvaj en Interreto. Oni povas redaktigi kaj kompletigadi ĝin.

La sistemo ebligas elekti vortarojn laŭ ĉiu ajn kombino inter la enkondukitaj lingvoj kaj samtempe elekti fakon

(tuton aŭ ekz. nur plantojn, nur mamulojn ks.). [Laŭ ret-info.]

Oficiala Retbutiko De Aea: <http://libroservo.esperanto.org.au>

Ankoraŭ estas nur malmultaj aferoj en la katalogo, sed la katalogo pligrandiĝas ĉiusemajne. Baldaŭ estos pli ol 600 aĉetebraj esperantaj varoj je via dispono. Ankaŭ eblas aĉeti “donackuponon”, se vi deziras sendi libron, diskon, aŭ alian esperantaĵon al konato aŭ familiano via. □

62a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

Sarajevo, la ĉefurbo de Bosnio kaj Hercegovino, estas destinejo de la 62-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazonta de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2006. Sarajevo estas la urbo kie kuniĝas la Oriento kaj la Okcidento. Dum jarcentoj ĝi estas simbolo de multkultureco kaj toleremo. Je distanco de nur cent metroj situas ĉefpreĝejoj de katolika, islama, ortodoksa kaj juda religioj, kaj ĝi ne malofte estas nomata “eŭropa Jerusalemo”. La kongresa ĉeftemo “Multkultureco kaj tutmondiĝo” ŝajne ne povus trovi pli trafan medion por sia pritraktado. Sed por ke la dis-

kutado de la ĉeftemo kaj la spertado de Sarajevo estu pli aŭtenta, necesas partopreno en la kongreso de junaj esperantistoj el kiel eble plej multaj landoj de la mondo, precipe el ekstereŭropaj kiuj malpli ofte aperas en TEJO-aranĝoj. La organiza teamo de la kongreso speciale invitas junajn esperantistojn de Nov-Zelando kuraĝe decidi pri la vojaĝo al Sarajevo por komune ĝui defiojn de la kongresa semajno. Bonan vojaĝon kaj ĝis la revido! Por akurataj informoj pri la aliĝreguloj kaj la kongrespreparoj, bonvolu viziti nian retpaĝaron: www.esperanto.ba.

La Nova Forno De Onklino Matilda

rakonto por infanoj

de Tony Peterson

Iun tagon, Fraŭlino Proper aĉetis por sia Onklino Matilda novan fornon!

Kiam ĝi liveriĝis, Fraŭlino Proper diris al sia Onklino Matilda: “La vendisto diris ke ĉi tiu estas magia forno!”

“Magia forno? Mi neniam antaŭe vidis magian fornon. Kion ĝi faras? Kiel oni kuiras per magia forno?”

“Nu,” Fraŭlino Proper klarigis, legante la instrukciojn, “kiam vi deziras kuiru ion, vi metu ĉiujn ingrediencojn en bovlon aŭ kaserolon, metu en la fornon, fermu la pordon kaj turnu ĉi tiun manilon.”

“Kio okazas tiam?” Onklino Matilda deziris scii.

“Sonilo sonoras, kaj la manĝaĵo estas kuirita. Kaj la manĝaĵo estas ĉiam perfekta!”

“Sonas tro bone por esti vere, Gladys. Mi ne fidas magiajn objektojn! Io malbona certe okazos!” Onklino Matilda diris, dum ŝi frapetis per sia piedo laŭte.

Fraŭlino Proper diris: “Bone, mi kuiras kukon, kaj esperas ke ĝi estos tiom perfekta kiel la libro diras.

Ŝi serĉis kuko-pleton, ovojn, lakton, buteron, sukeron kaj farunon.

“Ĉio ĉi faros kukon.”

Ŝi metis ĉiujn ingrediencojn sur kuko-pleton, metis ĝin en la fornon, fermis la pordon kaj turnis la manilon.

Tiam la du virinoj atendis. Kaj atendis! Kaj atendis!!

“Ĉu io devas okazi, Gladys?”

Fraŭlino Proper estis tre ĉagrenita

kaj diris: “Mi turnos la manilon denove...nur ĉi-foje, pli forte!!”

Fraŭlino Proper turnis la manilon denove, sed tiom forte ke la manilo falis de la forno.

Ili ne bezonis atendi longe por ke io okazu.

La sonilo sonis laŭte.

Kiam Fraŭlino malfermis la forno-pordon, bela kuko estis sidanta tie!

Onklino Matilda diris: “Gladys, estas mirinde!”

Tiam la sonilo sonis denove, kaj jen estis alia kuko en la forno! Poste alia kaj alia kaj alia!!”

Fraŭlino Proper kaj Onklino Matilda prenis unu kukon post alia el la forno, kaj metis la kukojn ĉie kie ili trovis lokon por ili en la malgranda dometo.

Estis kukoj sur la tablo, sur la fridujo, en la ŝrankoj kaj eĉ en la kuireja pelvo!

“Kia malordo! Kion povas ni fari nun, Gladys?” Onklino Matilda kriis.

“Mi ne scias! Estas via magia forno, ne la mia!”

Sed, subite, Fraŭlino Proper vidis la manilon de la forno sur la planko. Ŝi prenis la manilon de la planko, metis ĝin sur la forno-pordon kaj turnis ĝin, rapide, laŭ la kontraŭa direkto!

Subite, la sonilo de la forno ĉesis soni kaj ne estis pli da kukoj.

“Kion ni povas fari kun tiom da kukoj?” Onklino Matilda diris.

Subite, la forno-pordo →p.27

AUNT MATILDA'S NEW STOVE

a children's story

by Tony Peterson

One day, Miss Proper bought her Aunt Matilda a new stove!

When it was delivered, Miss Proper said to her Aunt Matilda: "The salesman said this is a magic stove!"

"A magic stove? I've never seen a magic stove before. What does it do? How do you cook with a magic stove?"

"Well," Miss Proper explained, reading the directions, "when you want to cook something, all you do is put all the ingredients into a bowl or a pan, put it in the oven, shut the door and turn this handle."

"What happens then?" Aunt Matilda wanted to know.

"A bell rings, and the food is cooked. And the food is always perfect!"

"It sounds too good to be true, Gladys. I don't trust magic things! Something bad is sure to happen!" Aunt Matilda said, as she tapped her foot loudly.

Miss Proper said: "Well, I will bake a cake, and hope that it will be as perfect as the book says it will be.

She looked for a cake-tray, eggs, milk, butter, sugar and flour.

"All this will make a cake."

She put all the ingredients into a cake tray, put it in the oven, shut the door and turned the handle.

Then the two women waited. And waited! And waited!!

"Is something supposed to happen, Gladys?"

Miss Proper was very annoyed and

said:

"I will turn the handle again...only this time, stronger!!"

Miss Proper turned the handle again, but so strongly that the handle fell off the stove.

They didn't have to wait long for something to happen.

The bell rang loudly.

When Miss Proper opened the oven door, a lovely cake was sitting there!

Aunt Matilda said: "Gladys, it's wonderful!"

Then the bell rang again, and there was another cake in the oven! Then another and another and another!!

Miss Proper and Aunt Matilda took one cake after another from the oven and put them everywhere they could find a place for them in the tiny cottage.

There were cakes on the table, on the refrigerator, in the cupboards and even in the kitchen sink!

"What a mess! What can we do now, Gladys?" Aunt Matilda cried.

"I don't know! It's your magic stove, not mine!"

But, suddenly, Miss Proper saw the handle of the stove on the floor. She picked it up, put it on the oven and turned it around, sharply, the other way!

Suddenly, the stove's bell stopped ringing and there were no more cakes.

"What are we going to do with all the cakes?" Aunt Matilda said.

Suddenly, the oven door →p.24

ekmalfermiĝis. Tiam, unu post unu, ĉiuj kukoj en la ĉambro saltis de kie ili sidis kaj en la fornon! Kuko post kuko saltis en la fornon kaj malaperis!

Fine, kiam ĉiuj kukoj malaperis, Fraŭlino Proper diris: "Nu, ni redonos tiun fornon tuj morgaŭ!"

Onklino Matilda diris al sia nevino: "Jes, nepre! Mi kredas ke estas saĝe ne havi fornon kiu kuiras kaj manĝas siajn proprajn manĝaĵojn, Gladys! Alie, mi ĉismorte malsatus!"

"Mi ne sciis ke fornoj estas tiom danĝeraj!"

Onklino Matilda diris: "Tio estas vera. Kaj tial mi diris al vi ke mi ne fidas ion ajn magian!"

Kaj tiel estis, post tiam. Precipe magiajn fornojn!

opened wide. Then, one by one, all the cakes in the room jumped from where they were sitting and into the oven! Cake after cake jumped into the oven and disappeared!

Finally, when all the cakes had disappeared, Miss Proper said: "Well, we'll take that stove back first thing tomorrow!"

Aunt Matilda said to her niece: "Yes, most definitely! I think it's only wise not to have an oven that cooks and eats its own food, Gladys! Otherwise I'll starve!"

"I didn't know stoves were so dangerous!"


Aunt Matilda said: "That's true. And that's why I told you I didn't trust anything magic!"

And she didn't, ever again! Especially magic stoves! □

libroj ricevitaj


Red./Ed. Lee Chong-Yeong & Liu Haitao: *Al nova internacia lingva ordo/Towards a New International Language Order*. Rotterdam 2004: Universala Esperanto-Asocio. 239p.

Trilingva libro: 11 artikoloj, unue en Esperanto, poste en la angla, kaj laste en la japana.

La temoj kaj karakteroj de la artikoloj tre multe varias. Nenio vere entuziasma. — 

Ziko Marcus Sikosek: *Sed homoj kun homoj*. Rotterdam 2005: Universala Esperanto-Asocio. 197p.

La Unua Universala Kongreso de Esperanto okazis en Boulogne-sur-Mer, Francio, en 1905. Do la jaro 2004 estis la centjara datreveno de la naskiĝo de la Universalaj Kongresoj. (La libro, miskalkulinte, diras ke la centjariĝo okazis en 2005). Pro interrompoj kaŭzitaj de la du mondmilitoj, okazis 89 Universalaj Kongresoj dum tiu periodo.

Ĉi tiu libro informas pri ĉiu el la kongresoj, kun multaj fotoj kaj detaloj. Kiel fonto de historiinformoj pri la Esperanto-movado, la libro estas ne nur utila, sed eĉ (mirige!) interesa — 

Parolado de D-ro Peter Ellyard

je 19/04/04 en Melburna Esperanto-Societo

Mi estas pasia esperantisto, sed en la Movado mi ne ludas gravan rolon, precipe ĉar mi faras tro multajn aliajn taskojn. Kaj ankaŭ, ĉar mi ĉiam malkontentiĝas pro la tro granda nombro da esperantistoj ne dezirantaj progresigi nian lingvon same rapide kiel mi deziras. Kiel unu el niaj membroj demandis: “Ĉu ni estas briĝkluboj aŭ ĉu temas pri mondovizio?”

Estas granda diferenco. Membroj de la Esperanto-movado neniam faras al si tiun demandon. Ni vizitadas kunvenojn havantaj malsamajn aspirojn kaj rolojn. Mi ne plendas: por ĉio estas rolo, sed tre klaras, ke se ni nin organizas surloke kiel briĝklubon, kio estas ofte la kazo ĉirkaŭ la mondo, en preskaŭ ĉiuj lokoj, tiam la tuta sistemo estas tre malfacile ŝanĝebla. La supro kaj la malsupro tendencas reflekti unu la alian. Mi estu maldelikata: laŭ mia sento mankas al la Centra Oficejo en Roterdamo strategia vizio. Nur fragmentoj, sed ili malhavas multon da tiu vizio, kompare kun kio eblas.

Mi pensadis pri la afero, kaj mi konas tre malmultajn pasiajn esperantistojn kiuj estas entreprenistoj, ĉefoj de komercaj korporacioj, aŭ homoj kiuj estas gravegaj agentoj por iu aŭ alia ŝanĝado. Laŭ mi en tio kuŝas grava mesaĝo por ni: se ni deziras ke Esperanto plibonigu la mondon, aŭ eĉ nur havu signifan rolon en la mondo, pli signifan ol ĝi havas nun, tiam ni fakte devas pensi alimaniere kaj labori alimaniere. Ni fakte devas disvolvi vizion por la estonteco de la movado. kaj mi

opinias ke la vizio de Zamenhof estis la ĝusta: ke ĉiu planedano parolu Esperanton kiel duan lingvon kaj samtempe glori sian kulturon plu uzante sian unuan lingvon. Ni devas ne plipotenciigi unu nacian lingvon al Internacia Lingvo por internacia komunikado ĉar tio kondukos al kultura imperiismo.

Se la angla lingvo uzatas kiel internacia lingvo, la rezulto estos, ke ni ĉiuj finiĝos holivudecaj. Kelkaj homoj diras: “Tio estas bonega”, sed mi persone ne samopinias: mi dezirus havi certan kundecidon pri tiu holivudiĝado de la globo. La grava flanko de tio estas, ke ni nepre devas kompreni, ke ekzistas grandaj danĝeroj por la celebrado de kultura diverseco, se ni superigas iun nacian lingvon al universala leĝa pozicio kiel internacia helpolingvo.

Ni rigardu Eŭropan Union: nun 15-membra sed baldaŭ 25-membra, kaj post kelkaj jaroj verŝajne 35-membra. Kaj ni pluvidu al la jaro 2015, supozante ke tiam estos 40 membroj en tiu Eŭropa Ekonomia Komunumo. Ĝia parlamento donas al ĉiu la rajton paroli en sia propra lingvo, mi do povos ekstari kaj paroli portugale, dum samtempe mia parolado tradukatas al ĉiuj aliaj lingvoj. Facile videblas, ke aplikiga multobligado. Se mi ekstaros kaj parolos en la hungara lingvo, mia leĝa rajto, neniu komprenos min rekte. Kaj kiom da personoj troveblos kapablaj traduki el la hungara al la dana aŭ al la portugala? En tia situacio la lingvotradukistoj ĉie en la mondo povos fiksi sian propran honorarion, ĉar ili estas

tiom malmultaj. La lastan fojon kiam mi ekzamenis ĉi tiun problemon, mi eltrovis, ke $\pm 70\%$ de la kostoj por funkciigi la eŭropan parlamenton konsistis en transskribado kaj tradukado. Kaj ĉar tio aplikigaŝ al la nunaj 15 landoj, vi komprenos ke ekzistas granda problemo ĉe 40 membrolandoj.

Ekzistas nur du manieroj solvi ĉi tiun problemon. La unua solvo estas tiu aplikata de Unuiĝintaj Nacioj, kie oni deklaris unuarangajn kaj duarangajn lingvojn: la A-Grupo kaj la B-Grupo. Ni ekzemple povus postuli, ke oni parolu nur en la germana, franca, hispana, rusa aŭ angla ... eble iam ni sukcesos ke Esperanto akceptatu kiel unu el la oficialaj lingvoj, tiam ni sukcesos ankaŭ forigi la kulturan abismon inter la argentinanoj kaj la brazilanoj. Se ambaŭ povus paroli esperante, la brazilanoj ne havus la kulturan humiligojn ke ilia lingvo estas malpli grava ol la hispana. Teorie la sistemo adoptis membran egalecon, sed tio ne ekzistas dum kelkaj lingvoj estas permesitaj kaj aliaj ne.

Zamenhof kreis Esperanton antaŭ cent dek jaroj, kaj eble, eblete, lia tempo alvenis nun. La kuniĝado sur nia planedo estas tia, ke povas ekveni la ebleco, ke Esperanto survojiĝos. Sed nepre ne sub la ĝisnunaj kondukantoj kaj konceptoj. Se niaj organizaĵoj estas kiel briĝkluboj anstataŭ kiel mond-vizitejoj, ili ne havos sukceson en la debato.

Ĉi tio estas la plej grava parto de la kerno de mia mesaĝo, sed la mesaĝo entenas ankaŭ aliajn aspektojn. Ĝuste nun la de mi sentata tiranio de la angla lingvo plenigadas Interreton. Ĉu ne estus juste, se mi estus latvo, ke mi povu

maŝinskribi mian e-poŝton en la latva lingvo, malfermu komputilpaĝon, ttt., kaj elektu sendi la mesaĝon al la celato en la turka aŭ afgana aŭ suomia lingvo. La ideo havi traduksistemon en la kerno de Interreto povas efektiviĝi nur pere de esperanto, ĉar ĝi estas la nura vivanta lingvo sufiĉe regula por taŭgi tiel. Provoj pri multobla tradukado fiaskis: post kvar- aŭ kvin-fojaj tradukoj la rezulto estas sensenca, ĉar la lingvoj havas multegon da nekonsekvencaĵoj. La nura uzata lingvo sufiĉe kapabla doni fideblajn rezultojn estas Esperanto, ĉar ĝi estas tiom regula, ke oni povas, kiel ĉiu esperantisto scias, krei novan vorton kiun poste ĉiu tuj komprenas samsignifa. Mi ne konas iun alian lingvon, escepte de eble partoj de la germana, kiu ebligas tion. Mi povas en Esperanto krei novan vorton per la baza vortaro de Zamenhof, kiun neniu sur nia planedo antaŭe uzis, kaj mi ne bezonas klarigi la signifon de tiu vorto. Bonvolu pensi pri tio, pri tiu kapablego, speciale se vi uzas elektronikan traduksistemon, aŭ ion similan.

Do, specifaj aferoj devos okazi. Mi opinias, ke la Esperanto-movado devos ŝanĝi sian pensmanieron. Mi tute ne kontraŭas, ke iu deziras kunveni ĉiun lundovesperon por paroli esperante kun geamikoj. Tio estas bonega kaj laŭdinda laŭ mi. Sed multaj el tiuj homoj samtempe revas, ke Esperanto estu io pli utila kaj pli grandioza, eble eĉ en ilia vivdaŭro. En tiu kazo ni devos fari grandajn ŝanĝojn en la pensmaniero de tiuj, kiuj gvidas la Esperantomovadon.

Miakulpe, mia profesio estas ĝuste pri tiaj aferoj, nome igi homojn pensi pri granda vizio kaj ellabori kiel realigi ĝin. Estas por tio ke homoj pagas al mi,

labori por iliaj estontecoj. Konsekvence mi pensas pri kia ni ŝatus esti, en la estonteco, iun kompanion aŭ iun komercon aŭ iun landon. La registaro de Indonezio ĵus petis min viziti ilin kaj labori kun la registaro por prepari vizion por la estonteco de la indonezia edukado. Ĉiu kiu rigardis la indonezian edukadon povas vidi grandan fuŝaĵon. Sed la grava punkto pri tio estas, ke la nura maniero en kiu ili povos igi ion ajn okazi, estas unue havi vizion. Alivorte: ni ekzameni, kia ni ŝatus la indonezian edukadon en la jaro 2020. Ekzemple, kiuj estas la kvalitoj? Edukado interesas, ĉar ĝi estas la plej grava afero, kiun ni faras por prepari nin por la estonteco; nenio estas pli grava. Ĝis nun ni ŝanĝis edukadon samidee kiel ni ŝanĝis nian Esperanto-movadon. Ekzemple: io malĝustas en nia socio, kia drogoj. do ni metas drogfakon en la lernejan studaĵaron. Poste ni eble havas problemon pri hundoj urinantaj en la stratoj; ĉu ni enmetu tian fakon en la studaĵaron? Kie desegni la limon? Ĉikaze la temo estas ŝanĝi la edukistemon. Se oni rigardas la nunan lernejfakaron, oni trovas ke ĝi pleje koncernas ĉion pri kio nia socio misdisvolviĝis dum la ĵusaj kvardek jaroj. Do idaro antaŭen rigardanta parte estas malantaŭen rigardanta.

Nuntempe edukado estas demandanta, kiuj estas la problemoj hodiaŭaj; kion ni bezonas ripari por prepari la homojn por la estonteco? Momente mi laboras por eduka administranto, kaj la maniero laŭ kiu mi laboras pri la edukistemoj estas demandi, kia aspektos la jaro 2025. Kiaj estas la lertoj kaj kapabloj bezonataj de persono por prosperi en tiu mondo? Kiel, ni kreu eduk-

sistemon, kiu havigos tiajn lertojn kaj kapablojn por tiuj homoj? Temas pri estontecon pelanta sistemo.

Se ni aplikus tion al Esperanto, ni demandu kiun rolon Esperanto ludu en la jaro 2025. Kiujn aferojn ni faru por okazigi tion? Ekzamenante laŭ ĉi tiu maniero, ni difinas la celon anstataŭ la tielon. Siakulpe, Aŭstralio havas unu el la plej celdirektaj kulturoj sur la planedo. Tion kaŭzas parte la fakto, ke ni importis grandan kvanton da eŭropanoj, kiuj reinventis agrikulturon por aŭstraliaj situacioj, reinventis la anglan kulturon por aŭstraliaj situacioj. Pro tio ni estas spertaj fiksistoj kaj adaptiĝistoj, sed ni ne tre spertas fari novajn aferojn neniam faritajn antaŭe. La tialoj estas, ke ni kutimas ne difini tre klare la celojn.

Kiam mi en 1987 laboris pri Unuiĝintnacia projekto en Koreo, unu el la registaraj ministroj rakontis al mi, kiel en Julio de 1960, tuj post la fino de la korea milito dum Koreo estis en misordo, grupo de homoj kunvenis en la Blua Domo, la ekvivalento de la "Blanka Domo", kaj anoncis, ke ili deziras igi Koreon disvolviĝinta lando antaŭ la jaro 1985. Ili decidis, ke disvolviĝinta lando estas tiu, kiu kapablas membriĝi en la O.E.C.D. Fakte ili aliĝis al la O.E.C.D. je la unua de julio 1985. Kiam ili komencis, ili havis unu universitaton. Seulo estis urbo por 450 000 homoj enhavanta tri milionojn. Mi povus multobligi tiajn faktojn. Sed ili havis revon kaj realigis gin.

Dum multaj jaroj mi jam laboras kun la registaro de Malajzio. Nune ili kreas du novajn superurbojn. Unu nomigas Cyberjaya, ilia nova altteĥnika ĉefurbo, kaj la alia nomiĝas Putrajaya,

ilia nova nacia ĉefurbo. Mi estis en ambaŭ kaj laboris por ambaŭ. Jen do la malgranda Malajzio konsiderata kiel neprogresema lando. Cyberjaya ekaktivis antaŭ tri jaroj, per la malfermiĝo de la Multmedia Universitato, kun ok mil studistoj en la unua tago.

Rigardante korporaciojn, oni konstatas la samon. Korporacioj diras: “Mi havos merkatsparton certagrandan. Kion fari por tio? Ni devas certakvante reklami, starigi certajn prezojn, por atingi tiun celon. Tion faras komercantoj ĉiutage. Tio estas normala maniero laŭ kiu oni planas la estontecon. Komercanto ne atendas tion, kio okazos; ili fakte igas tion okazi. Unu el miaj favoraj diroj estas: “Tiuj kiuj hodiaŭ ne vivas en la estonteco, morgaŭ vivos en la estinteco”.

Ni retrovenu al Esperanto. Esperanto estas belega heredaĵo, kaj granda eblo. Zamenhof estis viziulo, sed mi pensas ke malmultaj anoj de la esperantomovado vere komprenas, kiom vizia li estis. Mi ne scias, ĉu li iam antaŭvidis Eŭropan Komunumon. Mi neniam legis pri tia vizio lia, sed lin naŭzis vidi, kiom militojn kaŭzis kulturaj diferencoj. Memoru tamen, ke la Eŭropa Komunumo ne havis ekonomian celon en la komenco. La unua paŝo estis la kunligo de la francoj kaj germanoj por ke iliaj vivoj tiom interplektiĝu, ke milito ne plu povu reokazi inter ili. Do estis por eviti estontajn militojn. Nur poste venis ekonomiaj konsideroj. Ili decidis, ke ili devu interkomerci, kaj konsekvence bezonis komunajn agoplanojn pri imposto, moninvestado. k.t.p. Sed tio venis poste: la motivado estis paco. Estas nun malfacilege imagi, ke Francujo kaj Ger-

manujo ree intermilitos. Kvankam ĉio eblas, la grado de ebleco estis plej verŝajne 50% aŭ eĉ 100% en la jaro 1939, dum nun mi konjektus tiun eblon 1%. Vi do demandas, kio okazis el tiam nunen.

Multaj aliaj landoj havas en si kulturajn diferencojn, ekz. la hutuoj kaj la tutsioj. Estas grave, ke ankaŭ ŝanĝiĝos la karaktero de tribanigado. Aparteno al tribo kutimis signifi: “Mia vivo temas pri ĉio ĉi, kaj tial mi estas kontraŭa al ĉiu alia tribo”. En paleolitikaj epokoj mia tribo estis en moviĝanta militostato kun ĉiuj aliaj triboj min ĉirkaŭantaj. La homaro disvolviĝis tiel, kaj necesis granda salto por diri: “Tribaneco nun temas pri celebri la diferencojn en la kadro de globa unueco. Ni povas vidi ekzemplojn de tio. Multaj el vi konas la koncepton pri mondomuziko. Mondomuziko estas tribo, sed ludatas en la kadro de globa unueco. Do triboj nun funkcias en tute nova maniero.

La bela aspekto de Esperanto estas, ke ĝi permesas celebri diferencojn sen kulturaj imperiismo kaj malegaleco. Delegitoj povos ekstarri en la eŭropa parlamento parolante esperante kaj samtempe akceptante ĉies kulturojn. Ne gravos ĉu ili estas granda lando kia Germanujo, aŭ malgranda kia Liĥtenŝtejno. Ne plu temas pri potenco, aŭ la potenco de via kulturo, nek pri financa potenco. Temos pri glori diferencojn kaj interkulturajn respekton kaj harmonion. Esperanto estas grava parto de la ilaro por krei tiujn interkulturajn respekton kaj harmonion. La globeciĝo de la mondo, la kreskanta kunligiteco de ĉio en la mondo, nia eneco en ĉio, estas parto de la kondiĉo.

Pluraj el vi konas la faman poemon de John Donne el la jaro 1620. Tiam li verkis la jenon:

*Neniu homo estas insulo, kompleta
en si mem;
Ĉiu homo estas parto de la kontinento,
parto de la tuto;
Se terpeco forlavatas de la maro
Eŭropo estas malpli, same ĉe la forfalo
de promontoro,
Same de bieno de viaj amikoj aŭ de
vi mem,
Ĉies morto malpliigas min, ĉar mi
enas la Homaron;
Kaj tial mi neniam specifigas por
kiu sonas la sonorilo,
Ĉar ĝi sonas por vi.*

(John Donne,
“Sindediĉoj pri ekaperantaj okazoj”
XVII)

Ĉu prave, ĉu malprave, ni nun trovas multajn homojn batalantaj en Irako aŭ partoprenantaj en la milito de terorismo, aŭ kunlaborantaj en ĉiaj projektoj ĉirkaŭ la mondo. Tio estas la moderna situacio. Sed kiel ni parolas unu al la alia? Kiel ni interkomunikas? Klarmonstre kreskas la bezono je interkultura interkomunikado. Sed ne kreskas nia povo efektiviĝi tion. La nura maniero efektiviĝi tion estas aferoj kia Esperanto. Estas pro tio, ke mi enestas Esperanton. En mia profesia laboro mi enas kelkajn projektojn kiuj, mi esperas, baldaŭ naskiĝos. Unu el tiuj estas nova globa sendokanalo, kia C.N.N., por verduleco kaj por homaraneco. Se ni sukcesos pri tio, mi kapablos determini, kion ĝi elsendos, kaj mi certigos, ke unu el la aferoj, kiujn vi povos fari, estas paroli en Esperanto tra ĝi. Tiel ni havos globan kanalon, tra kiu Espe-

ranto povos atingi ĉiun homon.

Alia ekzemplo estas sistemo por lingvotradukado, por kiu mi laboras por trovi grupon de investistoj por efektiviĝi tion. Mi rezignis peni influi U.E.A.-on en Roterdamo. Mi opinias ilin bonegaj, sed ili ne ŝanĝos la mondon. Mankas al ili la pensmanieroj por fari tion. La esperantistoj kutimas elekti por tiaj laboroj la malĝustajn homojn, nome homojn kiuj baze estas butikistoj kaj glorantaj la estintecon, anstataŭ esti estontaj mondoformantoj.

Mi laboradas kun grupo de kolegoj neesperantistaj. Mi al ili ne parolas pri Esperanto. Mi nur diras al ili, ke ni havos tradukosistemon, sed mi forgesos diri al ili, ke la kernlingvo estos Esperanto. Ili ne konscias pri kio mi parolas, sed ili pensas, ke ĝi estas granda idealo. Estas tio, kio gravas, kaj estas tio, pri kio mi volis paroli al vi hodiaŭ.

Mi deziras fini per unu el miaj favoraj pensoj. Ĝin verkis Ralph Waldo Emerson:

*Ne sekvu, kien la vojo kondukas.
Iru tien, kie ne troviĝas vojo, kaj
postlasu spuron.*

Dankon pro via atento!

(Tradukita de Marcel Leereveld,
kaj iomete modifita de [a].)

por ridigi vin

Alta arto interpreta

(premio) ... al la plej kvalita traduko Esperanten, ĉu versa ĉu proza, el Esperanto-verko.

(El la regularo de
Internaciaj Floraj Ludoj 1993)
[laŭ La Ondo de Esperanto]

☺ • **odlo bokserp**

Antaŭ kelkaj semajnoj, la ĉisupra gravuraĵo estis trovita sur folioj gluitaj al meteorito en la centro de Siberio. Sciencistoj konjektas ke ĝi falis sur la teron el Marso, kaj originis antaŭ inter 2 monatoj kaj 3 miliardoj da jaroj.

Ĝi pravas, kelkaj el ili diris, la darvinan Teorion de Evoluado; aŭ, laŭ aliaj, la Teorion de Inteligenta Planado. Dume, la lernejoj de Moskvo rajtas prezenti ĝin laŭ unu el tiuj, aŭ ambaŭ vidpunktoj, en siaj klasoj, aŭ ne, laŭ ordono de la ĉefbalaisto dungita de la Departemento de Centraj Edukado kaj Hejtado.

En Rusio konkurado tuj estiĝis inter la paleontologoj kaj ornitologoj aĝaj 8-9 en la lernejoj, por deĉifri, traduki, kaj — precipe — kolorigi la bildon de la gravuraĵo. La premiito ricevos novan skaloleton da kolorigokrajonoj, kaj elefantostampon.

Ĉar la kvarantenestroj de Aŭstralio rifuzas permesi la importon de elefanto-stampoj — ĉar ili timas la enkondukon de viruso kiu eble ekstermus la tutan indiĝenan elefantaron aŭstralian, ni devas starigi propran aŭstralazian konkurson:

1. Ni donos senkrajonan kaj sen-elefantostampan premion al la tri plej lertaj partoprenantoj [po 1 en tri familioj] almenaŭ 8-jaraĝaj sed malpli ol 120-jaraĝaj:

(a) kiuj sendos deĉifron, tradukon, kaj — precipe — kolorigon de la bildo antaŭ la 10a de februaro 2006.

(b) Kunlaboro inter familianoj estas fervore kuraĝigata.

(c) Partoprenanto rajtas sendi permaŝine aŭ permane faritan kopion de la bildo, laŭdezire. Originala bildo ŝirita el ekzemplero de Esperanto sub la Suda Kruco estos malakceptita. →p.10

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la marto-aprila numero: 15a de februaro 2006

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

esk@esperanto.org.au



La Aŭstrialia Esperanto-Asocio

P. O. Box 419 • Manly NSW 2095 • Aŭstralio

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Marcel Leereveld | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: Miranda Lutz | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: Stephen Pitney | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$30 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$20. Asocia membreco: \$10.

Pagu al Libroservo de AEA ĉe 143 Lawson St, Redfern NSW 2016.



La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

P. O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Nov-Zelando

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@xtra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano.

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €24,00. Pagu ĉe UEA al la konto ael-w de la Libroservo de Aŭstalia Esperanto-Asocio

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA